



R. L. 1921

Êu vi aũdis tion?

S. GRENKAMP-KORNFELD



Ĉu vi aŭdis tion?

Eldono de la
Esperanto Instituto
Venlo (Nederlando)



82-3

82.922-36=922

— Ĉu vi scias? La edzino de Pipman forkuris de li.
— Kaj kio okazis kun li?
— Nun li iom trankviliĝis; sed komence ni timis pro li.
Ni pensis, ke tiu homo freneziĝos — pro ĝojo.

Vi donis al mi falsajn informojn! Vi diris al mi, ke la patro de la fraŭlino ne plu vivas, kaj nun mi ekscias, ke jam de 3 jaroj li sidas en malliberejo.

Svatisto: Ĉu tion oni nomas vivo?

— Kien vi veturas?
— Al Londono.
— Fripono, kiam vi diras, ke vi veturas al Londono, vi volas, ke mi kredu, ke vi veturas al Ĝenevo; hazarde mi scias, ke vi vere veturas al Londono, do pro kio vi mensogas?

He, mastro! Tiu ĉi vianda supo estas tre malbongusta, kaj escepte de du fingroj de kelnero, en ĝi estis nek unu peco da viando.

Servisto, kiu ofendis sian mastron, staras antaŭ juĝistaro kaj estas punita. Post la fino de la proceso li demandas la juĝiston: Sinjoro juĝisto, mi volus fari nur unu demandon: Ĉu servisto neniam devas diri al sia mastro: „Vi azeno”?

— Neniam.
— Kaj ĉu oni povas diri al azeno: „Sinjoro”?
— Neniu tion al vi malpermesas.
— En tiu okazo: Ĝis revido, Sinjoro.

— Johano, kiom da piedoj havas ĉevalo?
— Kvar, po unu je ĉiu angulo.

Sinjinorino Tonja vekigis nokte kun ekkrio:
— Oh!

— Kio okazis? vokas ektimigita edzo.
 — Jam nenio... Mi sonĝis, ke nin ekatakis banditoj...
 Mi promenis kun Pipman...
 — Kun kia Pipman?
 — Vi ne povas lin koni... En sonĝo oni lin prezentis al mi.

El defenda parolado de advokato:
 — Nu, sinjoro prokuratoro, nenio interesa, ke ses atestantoj vidis, ke mia kliento ŝtelis; mi alkondukos al vi 60 atestantojn, kiuj pruvos, ke ili tion ne vidis!

En unu el la Brooklyn'aj ĵurnaloj aperis anonco:
 „Tiu, kiu perdis la monujon kun 900 dolaroj, povas esti trankvila. La monujo estas retrovita, dankon!”

Fragmento el preĝo:
 — Helpu al mi, Dio. Vi kompatas tute fremdajn homojn, kompatu do ankaŭ min...

Donnerwetter preĝas en la sinagogo. Li kliniĝas, balancas la kapon tien kaj reen, gestadas ĉiam pli kaj pli kaj fine en religia ekstazo estas krianta kaj batanta en pupitro. La najbaro admonas lin: „Ne kriaĉu tiel al Dio. KREDU al mi, ke vi atingos ĉe Li pli per mildeco ol per superforto”.

En la stacidomo

La vagonaro estas forironta nur post kelkaj minutoj. Pasaĝeroj sidas jam sur siaj lokoj.

Subite aŭdiĝas voĉo sur perono: „Sinjoro Malivat, sinjoro Malivat”. Iu eligas la kapon tra la fenestro kaj en la sama momento la vokinto vangfrapas lin.

La frapito manegardas la vizaĝon, sed subite li eksplodas per rido:

— Kiel mi lin trompis!
 — Kiel, vi — lin? Sed li ja vangfrapis vin!
 — Sed mia nomo ne estas Malivat!

— Manjo, mi petas vin, bonvolu rigardi en la salonon ĉu mi estingis la lumon.

— Mi ĝuste trapasis ĝin, Sinjorino, sed mi ne rimarkis, ĉar estis mallume.

— Paĉjo, mi ankaŭ volas iri morgaŭ al enterigo de mia onklino!

— Neeble Johaĉjo! Nur antaŭhieraŭ vi estis en cirko...

— Paĉjo, je kiu grado la akvo estas bolanta?

— Ĉe cent gradoj, mia fileto.

— Kaj kiel la akvo scias, kiam estas ĝuste cent gradoj?

— Ĉu vi scias, la konduktoro en la vagonaro rigardis min dum la tuta tempo, kvazaŭ mi ne havus la bileton...

— Kaj kion vi faris?

— Nenion. Mi rigardis lin, kvazaŭ mi havus la bileton.

Iu venas por vizito. Li sonorigas. Malfermas la servistino.

— Ĉu gesinjoroj estas hejme?

— Jes.

— Nu, do mi venos alian fojon.

Malkareco en la vilaĝo

— Ĉu mi povas ion aĉeti ĉe vi tiel malkare kiel en la vilaĝo?

— Ho, jes, sinjoro, poŝtmarkojn.

Preciza respondo

Esperantisto veninta Parizon demandas preterpasantan delegiton de UEA en la strato Royale :

— Pardonu, Samideano, ĉu estas vere ke, se mi daŭrigos tiun ĉi straton, ĉe ĝia fino estos Placo Concorde?

Eĉ se vi ne daŭrigos, respondas la delegito, estos tamen tie Placo Concorde!

El la memorlibro de esperanta kabaredisto

Alkoholo pereigas popolojn, sed unuopan homon ĝi ne ruinigas.

Ĉu vi frezeziĝis? En Julio vi decidis veturi al Nice? Tie ja estas nun minimume 40 gradoj en ombro!

— Kaj kiu ordonas al mi promeni en ombro?

Kio? plialtigon de salajro vi deziras? El kiu kaŭzo?

— Mi edziĝis, Sinjor'-direktoro.

— Pardonu al mi, sed mi ne respondecas materie pro malfeliĉaj okazoj okazintaj ekstere de nia fabriko.

Ĉu vi scias, Moric, la tuta vivo ŝajnas al mi simila al longa, fera ponto.

— Kial?

Ĉu mi scias?

— Kaj mi diras al vi, ke mi pli ŝatus esti malsana je tifo ol esti milionulo.

— ?

— Nu certe, ĉiuj milionuloj mortas, kaj el la tifo-malsanuloj nur 65 %.

Abraĉjo, se vi sciis kian ĉagrenon mi havas.

— Kio okazis al vi?

— Mia filino edziniĝos. Mi promesis al la bofilo kiel ŝian doton 20.000 fr. kaj mankas al mi la duono.

— Kial vi ĉagreniĝas? Kutime oni ja donas nur duonon.

— Ĝuste mankas al mi tiu ĉi duono.

Ĉu vi povas pruntedoni al mi 20 frankojn?

— Sed mi ja tute ne konas vin!

— Ĝuste pro tio, kiu konas min, tiu ne pruntedonus al mi.

Ĉu estas vere, Majer, ke vi kristaniĝos?

— Mi diros al vi la veron: Mi faras tion nur pro Orlov.

Li kristaniĝis antaŭ kelkaj semajnoj kaj serĉas nun kristanan amikon...

— Kien vi tiel kuras?

— Mi volas malhelpi batalon inter du homoj!

— Inter kiaj homoj?

— Inter mi kaj ankoraŭ unu.

Kaj, se vi permesas, pro kio vi volas eksedziĝi?

Ĉar mi estas edzigita.

Maljuna kartludisto kuŝas morte malsana. Lia edzino sopiras:

— Ah! Kiom da tempo vi malŝparis senbezone ĉe kartludado!

— Ho, jes! — eksopiras la mortanto — por karto-miksado!

La librotenisto Dikhaŭtov turnas sin antaŭ Nova Jaro al sia firmo C.K. & Kio kun peto pri plialtigo de salajro. Li estas skribanta la petoskribon kaj rimarkas, ke unu el liaj

kolegoj staras malantaŭ lia dorso kaj enrigardas la leteron.

Indignita li returnas sin:

- Pardonu al mi, sed kiel oni povas esti tiom nediskreta!
- Pardonu, mi pensis, ke vi skribas privatan leteron.

Ĉu vi legis, Sinjorino? Iu virino ricevis 25 pugno-frapojn!

- Feliĉe, nur unu estis mortiga!...

Kelnero! La biero estas malpura!

— Pardonu, Sinjoro, la biero estas pura, nur la glaso estas malpura!

Post bona tagmanĝo turnas sin Kohn al sia malnova amiko Drinkulov, kiu estas ĝiba.

— Kara Staĉjo, de dudek jaroj jam ni estas bonaj amikoj, mi devas do al vi konfesi, ke mi estas hebreo.

— Kara Abrahamo, sincero je sincero, mi ankaŭ al vi konfesos la plej grandan sekreton: mi estas ĝibulo.

— Panjo, rigardu tiun ĉi homon kun nigra vizaĝo. Ĉu tio estas kamentubisto?

- Ne, mia kara, tio estas negro, li ĉie estas tiel nigra.
- Hm, de kie vi tion scias, panjo?

Pipman petas en la sukeraĵejo pomo-kukon, sed post momento li ĝin redonas kaj petas ĉokoladaĵon, kiun li manĝas kun apetito; post ĝia formanĝo li leviĝas kaj volas foriri.

- Sinjoro, vokas la kelnero, vi ne pagis la ĉokoladaĵon.
- Sed por ĝi mi ja donis al vi pomo-kukon!
- Sed la pomo-kukon vi ankaŭ ne pagis.
- Kaj ĉu mi ĝin manĝis?

En la vagonaro

Anglino eniras en la vagonfakon por fumantoj; kontraŭ ŝi sidas iu sinjoro, kiu post momento ekfumas cigaron.

— Ho, Sinjoro, kiel stranga kutimo estas ĉe vi; ĉe ni oni petas la permeson antaŭ ol ekfumi.

— Pardonu Sinjorino, sed ni estas en la vagonfako por fumantoj, do mi ne devis peti vian permeson.

— Ho, kiel malĝentile, se mi estus via edzino mi enĵetus al vi venenon en la teon.

— Kaj mi, se vi estus mia edzino, mi eltrinkus la teon.

Paĉjo, donu al mi unu frankon.

Por kio?

Sur la korto staras almozulo, mi volus doni al li 50 centimojn.

Ĉambristino: Sinjoro bonvolas demandi, ĉu Sinjorino estos baldaŭ preta.

Sinjorino: Sed jam antaŭ unu horo mi diris al li, ke post 5 minutoj mi estos preta.

— Eble vi pruntedonus al mi 100 frankojn?

— Mi ne havas ĉe mi.

— Kaj en la hejmo?

— Mi dankas, ĉiuj estas sanaj.

Sur unu tomboŝtono, kiun starigis iu vidvo al sia edzino ni legis:

„Larmoj miaj ne revivigos vin, pro tio mi ploras”.

— Hieraŭ mi estis invitita al tagmanĝo ĉe gesinjoroj Delegitoviĉ, mi diras al vi: orienta lukso! La manĝilaro el vera oro!

— Kion vi diras? Montru al mi!

Sinjoro Pipman al siaj infanoj :

— Se vi estos dum la tuta semajno ĝentilaj, diligentaj kaj obeemaj, ni iros dimanĉe al sukeraĵejo por rigardi kiel oni manĝas glaciaĵon.

— Ĉu vi estis ĉe Spritulov ?

— Jes, mi estis hieraŭ, ĉu vi scias, li freneziĝis !

— Kion vi diras ?! Malfeliĉo ! Ĉu li vere freneziĝis ?

— Kaj kiel ! De mateno ĝis vespero li parolas sence kaj havas ĉiukelhore atakojn de furiozo. Kompletaj frenezulo !

— Kion vi faris ĉe li ?

— Mi klopodis babili kun li ... instigi lin, ke li redonu al mi la tri mil frankojn ...

Nu kaj ĉu li redonis ?

— Ne, tia frenezulo li ankoraŭ ne estas.

— Strange, kartludante vi ĉiam gajnas. Ĉe ĉevalaj vetkuradoj vi ĉiam perdas !

— Kion fari, mi ne povas miksi la ĉevalojn ...

Rotŝild : Kio ? Vi volas mil dolarojn kiel subtenon ?

Ne ! tio estas tro !

Vi ricevados de mi ĉiumonate 10 dolarojn tiel longe kiel mi vivos.

Malriĉa hebreo : Kion mi havos de tio ? Ĉe via feliĉo vi mortos morgaŭ !

Noktomezo. La stratoj estas malplenaj. La prezidanto de Centra Kalkulado revenas hejmen kun sia sekretario. Je angulo de la strato ili rimarkas du proksimiĝantajn figurojn.

— Ni transiru al la alia flanko de l' strato, diras la prezidanto.

— Kial ?

— Pli bone esti atentemaj. Ni estas solaj, kaj ili estas duope.

Sinjoro Pipman estas ateisto :

— Mi kredas je nenio ! Nek en Dio, nek en diablo ! Mi ne preĝas, mi ne rekonas la festotagojn, mi ne vizitas la sinagogon, unuvorte nenion !

Sed dum la Juĝa Tago ĉiukaze mi fastas, ĉar nenion oni povas scii : kaj se io simila ekzistas ?

Sinjinino : Via edzino opinias, ke mi havas 30 jarojn, via filino ke nur 28 kaj vi, kiom vi opinias ?

Sinjoro : La sumon.

— Moric, kial vi malfruiĝis al la lernejo ?

— Sinjin'profesoro ! Ĉe mia patrino naskiĝas knaboj. Du jam estas.

Ĉe fotografisto

Fotografisto : Mi petas vin, Sinjinino, fari kiel eble plej agrablan mienon.

Edzo : Gardu vin Dio, Heleno, ne faru tion, neniu vin rekonos.

Ĉu vi aŭdis, nia amiko, aŭtoro de operetaj tekstoj revenis al sia edzino.

— Nenio malbona, kontraŭe li sentos sin pli bona. Li nur skribados versaĵojn kaj la scenojn faros lia edzino.

Li gajnis 300.000 dolarojn

— Ĉu vi aŭdis ? Malriĉul gajnis 300.000 dolarojn.

— Ho, antaŭ ĉio ne Malriĉul sed lia frato, due li ne gajnis 300.000 dolarojn, temas nur pri 30.000 kaj fine li ne gajnis la 30.000 dolarojn, sed bankrotis je 30.000.

La dent-doloro

- Kial vi promenas kun bandaĝita vizaĝo?
- Mi frenezas pro dent-doloro. De tri tagoj mi maldormas.
- Kial vi do ne elŝiras al vi la denton?
- Mi timas, ke tio doloros min.

SinJORINO (al sia nova kuiristino): Je la sepa matene estas ĉe ni matenmanĝo.

Kuiristino: Bele, se mi endormiĝus, vi povas trankvile matenmanĝi sen mi.

Maljuna sinJORINO eniras tramveturilon. Ŝi veturas al „Malnova Muzeo” kaj petas la tramkondukiston, ke li atentigu ŝin, kie ŝi devas eltramiĝi.

Post kelkaj stacioj, la kondukisto aliras al ŝi, vokante: „Malnova Muzeo, elvagoniĝu”!

Amiko: Via edza Moŝto majstras sep lingvojn, vere admirinda homo.

Edzino: Ho! mi ankoraŭ pli scipovas!

Amiko: Kiel tio estas ebla?

Edzino: Nu, mi majstras jam mian edzon kun la sep lingvoj.

A. al sia konato: ĉu vi iam pripensis, kion vi farus, se vi posedus la enspezojn de Rotŝild?

B.: Ne, sed mi ofte demandis min, kion farus Rotŝild, se li estus posedinta miajn enspezojn.

Kvinjara knabeto perdis en la amaso patron; li ploras, serĉas, fine li turnas sin al policano:

— Ĉu vi hazarde renkontis unu sinJORON sen tia knabeto kiel mi?

— Helenjo, diru al mi sincere, ĉu vi neniam travivis malfeliĉan amon?

— KREDU al mi, ke vi estas la UNUA. La antaŭaj estis ĉiam FELIĈAJ.

— Vera Rubens, subskribita. Kiel vi opinias? Kiom mi povas por ĝi ricevi?

— Ses monatojn.

— Kaj ĉu vi asekuris la grandan ringon brilantan?

— Ne, mi ne scias, kie ĝin asekuri.

— En kiu ajn societo por la asekurado de vitro!

La mastrino kolere al la servistino:

— Sed, kiam mi dungis vin, vi diris, ke vi scipovas kuiri, kaj la de vi farita tagmanĝo ne estas manĝebla!

— Mi diris - senkulpigas sin la servistino - ke mi scipovas, sed pri via gusto mi donis neniun garantion.

SinJORO, helpante falintan de ĉevalo homon:

— Ĉu vi rajdas la unuan fojon?

Rajdanto kolerege:

— Ne, la lastan fojon!

La gasto en alia ĉambro, aŭskultante fortepianajn tonojn:

— Kiel mirindan teknikon posedas Via filino! Nur kun tia lerteco oni povas ludi nuntempan repertuaron! Ĝi estas sendube Richard Straus!

— Ah, mi ne pensas! La ĉambristino forviŝas polvon el fortepiano.

— Mi estas konvinkita, ke radio neniam forigos la gazetaron.

— Kial?

— Ĉu vi povas imagi, ke oni povas per radio hejtigi en la forno, aŭ involvi ian pakaĵon?

— Vi estas la unua viro, kiu min kisis — ŝi respondis ruĝigante.

— En tia kazo vi devegis supoze preni lecionojn koresponde...

60-jara maljunulo venas al kuracisto. Tiu ĉi prenas lian manon kaj konsternite diras:

— Skarlatino!

— Skarlatino? Je mia aĝo?

— Via mano tion montras; ĝi estas ruĝa.

— Ruĝa? respondis la malsanulo, — mi ja estas lakisto.

— Vi havas feliĉon, ke vi estas lakisto, alikaze vi havus skarlatinon.

— Vi opinias vin stenotipistino — indignas la ĉefo — kaj vi ne scipovas eĉ meti novan rubandon en la skribmaŝino!

— Kaj ĉu vi opinias, ke Paderevski scipovas agordi fortepianon?

La eŭropaj ŝtatoj volus reguligi siajn ŝuldojn en Ameriko similmaniere:

Mia kara Bill, pruntedonu al mi ankoraŭ dek dolarojn, kaj mi devigos miajn nepojn, por ke ili redonu al vi la kvin dolarojn, kiujn mi ŝuldas al vi.

Policano (al sinjoro revenanta hejmen je la dua nokte): Ĉu vi scias, ke estas malpermesate kanti, kiam oni revenas malfrue hejmen?

Sinjoro: Vere, vi estas prava, sed mi ankoraŭ ne revenas hejmen.

En provinca hotelo.

La ĉambristino vekas dormantan gaston:

— Sinjoro, dormu pli rapide! La littuko estas bezona! Mi preparas la tablon al tagmanĝo!

S-ino Maltrankvilinska: Ne, oni ne povas kun li vivi.

Ne povas, Vi eĉ ne imagas al Vi, kia homo li estas, mia edzo Maltrankvilinska, kaj kia maldiligentulo, kaj kia manĝegulo. La tutan tagon li havas ion en la buŝego. Eĉ kiam li laboras, li devegas manĝi.

Post unu jaro:

S-ino Neninlov, antaŭe Maltrankvilinska: Oni ne povas kune kun li vivi, ne povas. Vi ne imagas al Vi, kara S-ino, kia individuo estas ĉi tiu mia dua edzo, ĉi tiu Neninlov! Idioto, maldiligentulo, manĝegulo!

Kiel agrabla, dolĉa homo estis mia unua edzo, Antoĉjo Maltrankvilinska! kaj kiel diligenta! Eĉ dum manĝado li laboris.

— Kio, kvin leporoj kostas tiom da mono? Sed je tia sumo mi povus akiri ĉaspermeson!

— Jes, sed el tio vi ne havos ankoraŭ leporojn.

„Hm,.... se mi pluen promenos en tiu ĉi malnova vestaĵo, ĉiuj opinios min bankrotulo. Sed se mi aĉetos al mi novan vestaĵon mi vere bankrotos...”

— Kiel vi vin amuzis en Londono?

— Tre bone. Nur mi havis unu malagrablaĵon. Mi revis manĝi tie bifestekon, sed mi forgesis kiel ĝi nomiĝas angle.

Provinca komercisto kun ĝojo iras al la urbdomo por anonci la naskiĝon de sia filo.

La oficisto : „Vi estas la patro ?”

— Jes.

— Do, bonvolu ĉi tie subskribi.

La komercisto tenante la plumon zorge subskribas
Haŭdikulov & Kio.

— Mi sentas min lacega, mi malbonfartas. Mi baldaŭ
mortos, diras Jakobo.

— Kiomaĝa vi estas, demandas Levy.

— Mi havas okdek kvin.

— Dio certe pruntedonos al vi cent jarojn da vivo,

— Ridinda, malsaĝa vi estas, Levy.

— Kial, Jakobo ?

— Nu, kial Di'-Sinjoro prenis min je cent, se li povas
min havi je okdekkvin !

Fatala horo alvenis por la mortkondamnito, kaj oni
demandas lin pri lia lasta deziro, kiu laŭkutime estas ĉiam
plenumata.

Do, kion vi deziras, demandas la juĝisto : vinon, cigaredon ?

— Ne, sinjoro. Mi ŝatus lerni la anglan lingvon.

Unu anglo — turisto.

Du angloj — klubo.

Tri angloj — brita kolonio.

Distriĝo

— Juĝisto : Do vi pretendas, ke vi ĵetis vian edzinon
de la kvara etaĝo pro distriĝo ?

Akuzito : Jes, sinjoro juĝisto. Ni ja loĝis nur antaŭ
kelkaj tagoj teretaĝe.

— Kial vi ne estas ordenita ? demandas sinjorino dum
esperanta bankedo al akademiano.

— Ĉar mi jam estas tro maljuna, respondas la akademiano.

— Nu, kaj antaŭe ? — redemandas nediskrete la sinjorino.

— Antaŭe ? — Mi estis tro juna.

— Mi gratulas al vi ! Hodiaŭ estas la plej feliĉa tago
en via vivo.

— Sed mia edziĝofesto okazos ja morgaŭ.

— Ĝuste pro tio.

Knabeto : — Paĉjo, mia poŝhorloĝo haltis.

Patro : — Eble oni bezonas ĝin purigi.

Knabeto : — Ho, ne, mia paĉjo, mi jam banis ĝin.

Finita amindumo.

Du patrinoj interparolas :

— Kaj ĉu Karlo ĉiam amindumas vian filinon ?

— Ne, jam finita afero !

— Ĉu li ŝin lasis ?

— Ne, li edziĝis kun ŝi !

Riĉa bankisto rakontas al sia amiko :

— Kiam mi eklaboris, mi posedis nenion.

— Jes, sed tiuj, kun kiuj vi negocadis, estis tiam riĉaj.

Patrino (batpuninte ĵus sian fileton) : Ĉu vi pensas, ke
mi punas vin por mia plezuro ?

Fileto : — Do por kies plezuro vi punas min ?

En galerio de modernaj pentraĵoj.

— (Rigardante bildon) Mi diras al vi, ke tio estas sceno
el familia vivo.



— Kaj mi diras al vi, ke tio estas interbatala sceno de tigroj en marĉejo.

Oni serĉas en la gvidlibro : La pentraĵo prezentas ĉarman sunsubiĝon sur la maro.

Pravigita malkontento.

— Tio estas terura ! Post mia koncert-prezento mi ricevis nur kvin florbukedojn !

— Nu, vi ne estas ankoraŭ kontenta ? Ho, postulemulino !

— Kompreneble, ke ne, mi ja pagis por sep florbukedoj !

Sentdelikateco.

Petro : — Pro kio via edzino tiom ploraĉas ?

Kazimiro : — Nu, ĉar mi diris al ŝi, ke morto trafis ŝian patron, sed tio ne estas vera. Mortaĉis nur la nigra bovino, sed mi ne volis, ke ŝi subite tro ĉagreniĝu

Cinikulo.

Ŝi : Mi estis hodiaŭ ĉe bona antaŭdiristino. Ŝi prenis 20 frankojn kaj diris al mi, ke vi edziĝis kun mi nur pro mia doto.

Li : Kaj por tio vi pagis 20 frankojn ? Mi tion estus dirinta al vi senpage.

Soldato de ĉielo.

Tra la stratoj de Londono iras soldato de savarmeo, en uniformo. Lin postsekvas vilaĝanino, kiu ĵus vizitis sian filon-soldaton, kaj alparolas lin :

— Pardonu, ĉu vi ankaŭ estas soldato ?

— Jes, mi estas soldato de ĉielo.

— Mia Dio, kiom malproksime vi havas vian kazernon !

En ĝardeno.

Patrino diras al sia filo :

— Mi malpermesas al vi ludi kun Johano, ĉar li estas malbonedukita infano.

La filo respondas :

— Sed, kara panjo, ĉu Johano povas ludi kun mi ? Mi ja estas bonedukita knabo.

Fraso el letero.

Sinjoro skribas al iu, kiu malplaĉas al li :

„Se bastonbatoj estus skribeblaj, vi legus ilin sur viaj ŝultroj”.

Aktoro.

— Kiam mi ludis ĉi tie la unuan fojon, tiam la publiko preskaŭ prisieĝis la kason.

— Kompreneble, por ke oni redonu al ĝi la monon ?

Poemo.

— Rigardu mian novan robon : ĉu ĝi ne estas vera poemo ?

— Vi pravas, sed ne domaĝus, se ĝi estus pli longa je kelkaj versoj.

Sur la ponto.

Ŝi : Se mi saltus en akvon, ĉu vi savus min ?

Li : Kaj se mi respondus „jes”, ĉu vi saltus en akvon ?

- Ni vetu, ke mi estas prava.
- Mi estas preta riski mian kapon.
- Kaj mi mian monujon.
- Sed via monujo estas malplena.
- Same kiel via kapo.

- Mi havas bonegan metodon por ne pligrandigi la nombron de senlaboruloj.
- Kian metodon?
- Tute simplan, ne plu registri novajn senlaborulojn.

En Aŭtomobilo.

- Ne veturu tiom rapide, vi mortigos min.
- Oni ja mortas nur unu fojon!
- Ĉu vi kredas, ke tio ne sufiĉas?

Dependas...

- Ĉu via onklo estis mensomalsana ĝis la morto?
- Mi ankoraŭ ne scias. Oni legos nur morgaŭ lian testamenton.

Konsolo.

- La morto de mia edzo estus kruela frapo, se mi ne edziniĝus kun lia frato.
- Ĉu tio konsolis vin?
- Kompreneble, dank' al tio mi ne priploras edzon, sed nur bofraton!

Aforismo de maljuna fraŭlino.

- Mi ne edziniĝas, ĉar mi estas tro saĝa, por edziniĝi kun tia malsaĝulo, kiu min volus!

En restoracio.

- Kelnero, kion signifas „kokidino laŭ Roentgen”?
- Tute simple, sinjoro, oni ne vidas viandon, nur ostojn!

Donacoj.

- Mi aĉetis kiel geedziĝan donacon por niaj amikoj teservicon por 12 personoj.
- Nu, mi aĉetis tefiltrilon por 24 personoj.

Inter amikoj.

- Iam ni decidis, mia amiko kaj mi, ke ni ĉiam sincere diros al ni la veron pri ni....
- Nu, kaj?
- Kaj de tiu tempo ni ne plu interparolis.

Hebrea infano al panjo (kiu ĵus aĉetis kristnaskan arbon):

- Ĉu la katolikaj infanoj ankaŭ ricevas kristnaskan arbon?

— Instruisto: Nomu al mi hejman beston, dank' al kiu vi havas viandon por tagmanĝo kaj ŝuojn, kiujn vi portas.

- Infano: Mia patro, sinjoro profesoro!

Inter amikinoj.

- Vi havas tre belan pelton, ĝi certe tre multe kostis al vi.
- Nur tri histeriajn atakojn, mia kara.

Meteorologo.

- Kie vi laboras?
- En meteorologia instituto.

- Kion vi faras?
- Mi antaŭdiras la veteron.
- Nu, ĉu ĉiam viaj antaŭdiroj estas ĝustaj?
- Rilate al la vetero ĉiam, sed rilate al la dato, kiam ia vetero devas esti, tre malofte!

Malfacila demando.

Dum ekzameno de helpantoj al la Ruĝa Kruco profesoro demandas al la lernanto: Supozu, ke iu frostvundos orelojn; kion vi faros, por savi lin?

- Antaŭ ĉio mi frotos liajn orelojn per neĝo.
- Bone. Kaj kion vi faros, se tio okazos somere kaj ne estos neĝo?

Ŝparema virino.

- Kio? Nur unu leporon vi volas servi al tiom da gastoj? Tio ne sufiĉos.
- Ne timu, sufiĉos. Ĝi estas tiom neapetite preparita.

Inter amikinoj.

- Mi havas eksterordinaran sentokapablon; mi eksentas, kion homoj parolas pri mi.
- Ha, kiom vi devas suferi!

En niaj parlamentoj.

- Deputito 1: — Mi devas paroli por pruvi al niaj parlamentanoj, ke ni dediĉas tro da tempo al la diskutoj.
- Deputito 2: Mi ankaŭ!
- Deputito 3: Kaj mi ankaŭ!

Diplomato.

- Kara amiko, kredu al mi, se mia filino diros „jes”, vi povos esti fiera, sed se ŝi diros „ne”, vi povos esti feliĉa.

Miskompreno.

- Juĝisto al akuzito: Ĉu vi estas edzigita?
- Akuzito: Ne, sinjoro juĝisto, la blu-makulo, kiun mi havas sub la dekstra okulo, estas de mia amiko.

En la lernejo.

- Instruisto (kolere): Kiu ekkriis!
- Voĉo: Mi.
- Instruisto: Kiu mi?
- Voĉo: Tiu, kiu kriis.

Kugelŝvanc: Se oni povus fari bonan aferon, mi estus kontenta.

Blum: Oni povas tre facile. De kelkaj tagoj plialtiĝis la prezo de esperantaj libroj. Vendu tutan vagonon da ili — kaj vi gajnos multe da mono.

Kugelŝvanc: Kion vi diras? Vendi vagonon da ili? Sed mi havas nek unu!

Blum (rezignacie): Nu, se vi ne havas librojn...

Filantropo.

- Ni petas vin afable, sinjoro direktoro, monsubteni nian belan entreprenon por militinvalidoj.
- Kun plezuro, sinjorinoj, jen ĉeko je dekmil frankoj.

- Ni tre dankas, sed vi ne subskribis la ĉekon.
- Mi tion scias, sed kiam mi donas ĉekon por bonfaraj celoj, mi faras tion ĉiam anonime...

Nova servistino.

Sinjinorino volas servakcepti novan servistinon, kiu venas la unuan fojon el la vilaĝo en urbon kaj diras al ŝi:

— Memoru, mia kara, ke ĉe ni la laboro estas pena, kvankam ni estas hejme nur duope: mia fratino kaj mi; mi ne scias, ĉu vi kapablos.

La servistino respondas: Estu trankvila, sinjinorino, en la vilaĝo mi priservis eĉ ses bovinojn!

Fama esperantisto diras al sia amikino: Por mia lasta novelo mi ricevis 50 frankojn.

- Hm, ŝi respondas, kiu gazeto ĝin akceptis?
- Neniu, sed simple mi forsendis ĝin en rekomendita letero kaj la letero perdiĝis. Mi reklamaciis kaj ricevis 50 frankojn.

Kiu profesio estas pli praktika?

— Aŭskultu, Abramĉjo, patron. Mi ja bone konsilas al vi. Estas tre bele, ke vi finsukcesis medicinon, sed restu dentisto.

- Mi volas esti okulisto, kiel Zamenhof.
- Idioto! Homo havas ja nur du okulojn, kaj da dentoj li havas tridek du. Kiu profesio estas pli praktika?

Inter du kolegoj.

La unua: Mia edzino de tri tagoj tiom forte tusas, ke mi ne povas dormi.

La alia: Nu, alvoku al ŝi kuraciston.

La unua: Ne necesas hodiaŭ, ĉar mi pasigos tiun ĉi vesperon en la esperanto-grupo.

Inter bankistoj.

- Mi petas, kara kolego, bonvolu sidiĝi.
- Mi dankas, mi sidis tri monatojn kaj tio sufiĉas al mi.

- Kial bankoj havas kradumitajn fenestrojn?
- Por ke la direktoroj al kutimiĝu al ilia aspekto.

Sinjinoro Kipman, post longa restado en Usono, volas fariĝi usona civitano. Li plenum la necesan ekzamenon pri la historio de Usono.

- Kiu estas nuna prezidanto de Usono?
- Sinjinoro Roosevelt.
- Ĉu vi konas la nomon de nia ĉefurbo?
- Jes, Vaŝingtono, kie okazis la Sesa Kongreso de Esperanto.
- Ĉu vi povus fariĝi prezidanto de Usono?
- Ne.
- Kial ne?
- Ĉar kiu restus en mia butikoj?

Ŝtelisto antaŭ juĝisto.

Juĝisto: Kial vi forprenis nur la komercaĵojn, kaj lasis la monon?

Akuzito: Vi ankaŭ tion riproĉas al mi, sinjinoro juĝisto, kiel mia edzino.

Li ne konas lin.

— Mi gratulas! Mi aŭdis, ke vi trovis bonan postenon en banko. Certe pro tio, ke vi konas la direktoron.

— Jes. Parte pro tio, ke mi konas lin, kaj parte pro tio, ke li ne konas min.

Esperanta poeto: Kia estas via opinio pri miaj novaj poemoj, kiujn mi verkis post dekhora lerno de nia lingvo?

Kritikisto: Vi volas aŭdi mian veran opinion?

Poeto: Mi dankas vin. Mi jam scias.

Edzino: Rigardu, najbara bovino eniris nian korton.

Edzo: Nu, melku ŝin kaj poste elpelu...

— Kiel fartas via edzo?

— Tre malbone, neniel li povas morti.

— Kaj kiu kuracisto flegas lin?

— Neniu.

— Nu, ne estas do mirinde!

— Panjo, vi havas du blankajn harojn!

— Pro tio, mia infano, ĉar vi estis neĝentila knabineto.

— Kaj kiom vi estis neĝentila, panjo, por mia avino!

Estas rimedo.

Pipul: Ĉu ne ekzistas rimedo por eterna paco?

Trinkul: Kompreneble jes. Oni nur interkonsentu, ke en okazo de milito la venkinto pagos la militŝuldojn!

Kugelŝvanc kaj Donnerwetter eniras oficejon de konata bankisto kaj helpopetas. Ili estas tre malpuraj.

Bankisto rigardas ilin kaj ekkrias kolere:

— Mi ne parolos kun vi antaŭ ol vi ŝanĝos la ĉemizojn.

Kugelŝvanc kaj Donnerwetter eliras el la oficejo. Ambaŭ estas mirigitaj.

— Mi ne komprenas, Abramĉjo, kion li gajnos, se mi almetos vian ĉemizon kaj vi la mian.

Du drinkuloj revenas hejmen post balo. Survoje ili renkontas funebran sekvantaron kaj akompanas ĝin ne sciante kial. Fine unu diras:

Fraĉjo, tiu poloneso daŭras tre longe hodiaŭ!

— Kukurik! Mi aŭdis, ke via flino edziniĝos kun Nigrokapov. Mi avertas vin: li sidis kvin monatojn en arestejo!

— Kion vi diras, kia fripono! Li diris al mi, ke nur tri!

Komerca letero.

Al firmo Idealo en Honolula.

Mi tre petas sendi al mi sakon da pipro, kvalito laŭ la lasta mendo. Krome, bonvolu atendi momenton, mi kontrolos en la magazeno, ĉu mi ne bezonas ankaŭ vanilon.

Mi ĵus revenis el la magazeno. Da vanilo mi havas sufiĉe, kaj la provizo da pipro, kiel evidentiĝas, ankaŭ sufiĉas.

Mi do petas vin, forsendu nek pipron nek vanilon.

Kun estimo...

S-ro Eltirul sukcesis post longaj petoj ricevi monhelpon de kelkdeko da frankoj de S-ro Dikulet, riĉa industriisto.

La saman tagon S-ro Dikulet enirante vespere luksan restoracion renkontas tie S-on Eltirul antaŭ granda porcio de bonega kaviaro.

S-ro Dikulet indigniĝas:

— Sinjoro Eltirul! Kion tio signifas? Antaŭ kelkaj horoj vi petis de mi monhelpon kaj nun vi manĝas kaviaron?

— Pardonu, sinjoro Dikulet, kiam mi ne havas monon — mi ne povas manĝi kaviaron, kiam mi havas monon — mi ne rajtas manĝi kaviaron. Do diru al mi, sinjoro Dikulet, kiam mi devas manĝi kaviaron?

En malliberejo.

En ĉelo troviĝas du arestitoj: Literaĉ kaj Popol; tiu ĉi iradas tien kaj reen. Literaĉ klopodas trankviligi sian kunloĝanton:

— Kial vi tiom iras, kial vi tiom iras, ĉu vi pensas, ke per tio vi malpli sidos?

Realisto.

Unu tagon Paul-Boncourt alparolas Briand:

— Sinjoro Prezidanto! Sur kio vi bazas vian diron, ke mi estas utopiisto?

— Sed — respondas Briand — mi neniam ion similan diris.

— Tamen unu el miaj amikoj informis min pri tio.

— Nenion similan mi diris.

— Eble vi diris, ke mi estas idealisto?

— Tion mi ankaŭ ne diris. Jen la plej bona pruvo, mi diros al vi sincere, ke mi opinias vin realisto...

La vizaĝo de Paul-Boncourt radias, sed Briand aldonas:

— ... realisto, kiu ne realigas.

Iu rentulo petis de barono Rotschild rekomendon: li volis pruntedoni sian kapitalon en fidindajn manojn kaj je alta procento.

Barono Rotschild respondis:

— Vi devas elekti, aŭ bone dormi aŭ bone manĝi. Ambaŭ kune estas neeble.

Konsolo.

— Rapide, kelnero, rapide!

— Kio okazis al vi?

— Mi englutis miajn artefaritajn dentojn!

— Ne domaĝas, mi ja servas al vi nun legomojn!

Li pli bone dormas en la lito.

Iu junaĝa verkisto invitis Bernardon Shaw al sia prelego. La eminenta aŭtoro rifuzis per jenaj vortoj:

— Pardonu al mi, sed mi frue iras dormi.

— Tamen vi povas ja fari por mi escepton.

— Sed, kara sinjoro, mi plej bone dormas en la lito kaj ne dum prelego!

Skoto en Parizo.

Dum la Universala Kongreso de Esperanto venis Parizon riĉa skota industriisto kun sia edzino.

Ni diru, ke li nomiĝas S-ro Mac Ready.

Lia edzino iris viziti la belulojn de la urbo, kaj S-ro Mac Ready intertempe havis rendevuon kun kelkaj eminentaj esperantistoj por diskuti pri la gravaj problemoj de nia movado.

Li devis renkontiĝi kun la edzino je la kvina posttagmeze.

Precize je la kvina S-ro Mac Ready venis al la rendevuita loko, sed la edzinon li ne trovis. Pasis la sesa kaj la sepa. La skoto maltrankviliĝadis ĉiam pli.

Ĉirkaŭ la oka lia akompananto diris:

— S-ro Mac Ready, se vi estas tiom maltrankviligita, telefonu al hotelo. Eble via edzino estas tie. Tio kostas nur unu frankon.

La skoto forviŝis la ŝviton de sia frunto kaj respondis:

— Nu, tiel maltrankviligita mi ankoraŭ ne estas!..

Politika interparolo.

— Diru al mi, kion vi pensas pri nia interna situacio?

— Ni esperu, ke ĉio estos ankoraŭ bona, sed ĉiuokaze ni estu preparitaj je ĉio plejmalbona.

— Do vi ne pensas, ke nia situacio pliboniĝos?

— Kial ne? Kontraŭe, mi esperas, ke venos pli bonaj tempoj, kaj ne forgesu, ke en miaj antaŭdiroj mi neniam eraris.

— Do kiel vi supozas, kiam venos la plibonaj tempoj?
— Tio dependas, ĉu ni fartas jam tiom malbone, ke pli malbone ne povas esti.

— Mi havas tute alian opinion. Ĉi-rilate mi ĉiam estis kaj restos optimisto.

— Kion mi respondu al tio, mia kara? Kun via optimismo estas same kiel kun unu el miaj parencoj. Li tre ŝatis glaciaĵon kaj multe da ĝi manĝis. Dum la tuta vintro li ĝojis pro la manĝotaj glaciaĵoj kaj la pasintan semajnon oni lin enterigis; la glaciaĵojn li ne ĝisatendis.

Sen ofendo.

La direktoro de firmo diktas leteron:

— Tre estimata sinjoro, mia korespondantino estas virino kaj tial mi ne povas dikti al ŝi tion, kion mi pensas pri vi; mi mem estante ĝentilhomo, ankaŭ ne povus tion skribi. Sed vi, kiu tia ne estas, povas konjekti, kion mi pensas pri vi.

Urĝa afero.

— Ĉu mi povas paroli kun la ministro de l'agrikulturo?

— Pri kia afero? Sinjoro ministro estas tre okupita. Ĉu tio estas grava afero?

— Jes, tre grava afero. Mi plantis rafanon sur mia balkono kaj ĝi ankoraŭ ne kreskis.

Kiam?

— Vi scias ja, ke paĉjo dormas, do ne brue amuzu vin!

— Kaj kiam paĉjo ne dormas, tiam li batas min, se mi brue amuzas min; do kiam mi povas brue amuzi min?

Juna ĵurnalisto vizitas Bernardon Shaw kaj petas informojn pri lia aperonta dramo. Al la demando Shaw respondas:

Jen mi diros al vi la enhavon de la teatraĵo. Unua akto: la viro diras „Mi amas vin!”, la virino respondas: „Mi adoras vin!” Dua akto: la viro diras: „Mi amas vin!”, la virino respondas: „Mi adoras vin!” Tria akto: La viro diras: „Mi amas vin!”, la virino respondas: „Mi adoras vin!” Jen ĉio!

La mirigita ĵurnalisto kapogratas sin. Fine li kuraĝas demandi:

— Nu, bone, Majstro, sed mi ne komprenas, kie estas la intrigo en tiu teatraĵo?

— Ha, la intrigo? — ekkriis Shaw — ĝi estas tute simpla, junulo; en ĉiu akto estas alia viro, kaj la sama virino en ĉiuj aktoj!

La anstataŭo.

— Hodiaŭ mi havis la honoron anstataŭi por la unua fojo mian ĉefon.

— Vi do akiris lian fidon. En kio vi anstataŭis lin?

— Li devis eliri el la kafejo kaj mi anstataŭis lin en la ludado de briĝo.

Super la ĉerko de amiko.

— Rigardu, kiel li bela aspektas en tiu ĉerko.

— Kion vi volas? Du monatoj pasigitaj en la montara regiono faris tion.

Amikinoj.

Diru al mi, Klara, ĉu dum la geedziĝa ceremonio mi aspektis nervema?

— Komence vi estis tre nervema, sed kiam Johano diris „Jes” vi tuj trankviliĝis.

Li trovis bonan rimedon.

Iu misiisto baptis negron kaj diris: — Nun vi ne plu nomiĝas Njem-Njam, sed Petro kaj memoru, ke vi devas manĝi vendrede viandon. *ne rajtas*

Sed vendrede la misiistro renkontas la negron kun granda peco da viando en la mano kaj riproĉas lin pro tio.

La freŝbakita kristano respondas kun naiva mieno:

— Sed, patro, mi ja ne manĝas viandon. Mi ĝin antaŭe surverŝis per akvo kaj diris same kiel vi al mi: „Nun vi ne nomiĝas viando, nur fiŝo”.

Instruo.

Patro: — Kiam vi sidus en tramveturilo kaj vi rimarkus, ke sinjorino eniras kaj ne plu estas sidlokoj, kion vi farus?

Fileto: — Mi ŝajnigus min dormanta.

La sola konsolo.

Al nekonsoliĝinta vidvino venas unu el ŝiaj amikinoj. Vidante ŝin en larmoj la amikino persvadas ŝin jene:

— Trankviliĝu, Karulino. Vi scias ja, ke ni ĉiuj estas mortidevaj.

— Mi scias tion.

— Baldaŭ pasos la ĉi-tera vivo kaj vi rekuniĝos kun li tie en la ĉielo.

— Ankaŭ tion mi kredas. Konsolas min tamen plej multe tio...

— Kio?

— Ke mi nun almenaŭ scias, kie li pasigas siajn vesperojn.

Kontentigi virinon estas malfacile.

Li: — Plejkara, ĉu vi volas esti mia edzino?

Ŝi: — Sed ĉu mi povos fari, kion mi volos?

Li: — Ĉiam kaj ĉie!

Ŝi: — Kaj mia panjo loĝos kun ni?

Li: — Kun plezuro!

Ŝi: — Kaj mi havos la ŝlosilon de la pordego?

Li: — Jes!

Ŝi: — Kaj mi povos eliri kaj reveni, kiam mi volos?

Li: — Jes!

Ŝi: — Kaj vi pasigados la vesperojn hejme?

Li: — Jes!

Ŝi: — Nu, tian jesulon mi ne volas kiel edzon!

Kompreneble!

La servistino havas liberan posttagmezon kaj la mastrino donas al ŝi moneron:

— Jen por via tramveturilo.

— Oh, sinjorino, mi dankas, ne penu. Mi ja revenos aŭtomobile!

Labordonanto.

— Kiu estas via profesio? — demandas juĝisto al akuzito.

— Labordonanto.

— Kiel oni devas tion kompreni? Al kiu vi donas laboron?

— Al vi, sinjoro juĝisto, al la tuta juĝistaro. Se mi ĉi tie ne estus, vi havus nenion por fari.

Malgranda kaj granda pirato.

Aleksandro la Granda plendis kontraŭ unu pirato pro lia malhonesto metio.

— Estas vere, mi estas pirato, respondis pirato. Sed nur tial, ĉar mi havas nur unu ŝipon.

Se mi havus ŝiparon, mi estus venkanto!

Nur unu voĉo mankis.

— Mi estis preskaŭ akceptota al ĥoro de ĉi tiea operejo, mankis al mi nur unu voĉo — diris bela Marta al sia amikino.

— Certe la via? estis la pika respondo.

Sufiĉas al li.

Advokato al sia kliento:

— Pardonu al mi, pli multe mi ne povis fari por vi.

Kliento: Sinjoro advokato, du jaroj sufiĉas al mi.

Pesimisto.

— Ĉu vi pasigis agrable vian tempon en la Internacia Hejmo Esperantista? Ĉu vi ne plu suferas pro reŭmatismo?

— Estas vere ke mi ne plu suferas pro reŭmatismo, sed la afero estas malagrabla, mi ne plu scias, kiam estos la ŝanĝo de la vetero.

Inter amikinoj.

— Ĉu vi kredas, ke oni povas enamiĝi de la unua rigardo?

— Kompreneble — kiam mi vidus lin en bela aŭtomobilo!

Promesanto.

— Sinjoro Altulof estas promesanta junulo.

— El kio vi tion konkludas?

— Ĉar li senĉese promesas redoni al mi dudek spesmilojn, kiujn mi pruntedonis al li.

En profesora entuziasmo.

Nenio mirinda, karaj lernantoj, ke Kolumbo malkovris Amerikon, sed tio estas mirinda, ke li divenis, kiel nomiĝas tiu ĉi mondparto.

La komplekso da kapoj.

En restoracio:

— Mi mendis bovan kapon kaj tiu ŝafa kapo alportis al mi porkan kapon!

Malnova familio.

— Ĉu vi scias, miaj antaŭuloj atingas preskaŭ la diluvan tempon.

— Ĉu ili originas el arko de Noe?

— Ne ofendu min; ili havis sian propran ŝipon.

Li bone respondis.

Amikino (kolere): — memoru, ke mi presigos ĉiujn leterojn, kiujn vi adresis al mi!

Li (flegme): — Vi povas tion fari, mi hontos nur pro la adreso.

Li enfalis.

— Mi petas, donu al mi kelkajn spesdekojn, mi estas orfo, de hieraŭ mi nenion manĝis.

— Malfeliĉulo! Orfo? Kaj kie loĝas viaj gepatroj?

— En la strato Ĝardena, sinjoro!

Pikema respondo.

Iun tagon unu el la pedantaj kritikistoj diris al la konata franca verkisto **Aleksandro Dumas**, filo :

— Pardonu al mi, majstro, sed kun via esprimo „**dolora malpleno**”, kiun vi uzis en via lasta verko, mi neniel povas konsenti.

— Kial? — demandas Dumas.

— Ĉar tie, kie nenio estas, kie estas malpleno, oni ne povas paroli pri doloro...

— Kaj ĉu vi neniam havis kapdolorojn? — respondas pikeme la verkisto.

En la lando de kanibaloj.

Ĉu vi ne havas ian deziron, antaŭ ol vi estos manĝita?

Bopatrino : — Jes, bonvolu ne informi pri tio mian bofilon!

Vortludo.

— Kion vi imagas? Vi opinias min idioto!

— Ho, tute ne! Neniam mi priopinias iun laŭ lia ekstera aspekto!

Ministro.

Ministro (kompreneble de fremda lando) havis aŭtomobilan akcidenton.

— Danĝera cerboskuo — konkludas la kuracistoj ĉirkaŭantaj la malsanulon en la lito.

— Ĉu tiu akcidento povas havi malbonan sekvon por lia cerbo?

— Plej verŝajne.

— Terure, sed ministri li certe ankoraŭ povos?

— Tutcerte...

Li ne timis.

Kohn rakontas pri sia komerca vojaĝo en Japanujo :

— En Tokio mi estis tri semajnojn, sed preskaŭ ĉiutage okazis tertremo.

— Kaj ĉu vi ne timis?

— Kial timi? La tero tremis pli ol mi.

La diferenco.

Kia diferenco estas inter la antaŭmilita kaj nuntempa fraŭlinoj?

— La antaŭmilita ruĝiĝis, kiam ŝi hontis, la nuntempa hontas, kiam ŝi ruĝiĝas.

Iam kaj hodiaŭ.

Kiam dum la oficiala kunveno de la Centro de la esperanto-movado oni parolis pri la malaltiĝo de la moralo, unu maljuna fraŭlino eldiris :

— Diradu kion vi volas, sed la esperantistoj estas nun pli moralaj ol iam.

— Kial?

— Kiam antaŭ tridek jaroj mi ĉeestis la Unuan Universalan Kongreson de Esperanto, mi ne povis trankvile pasi en la strato, kaj hodiaŭ neniu min rigardas...

Li estas prava.

Juĝisto : — Ĉu vi ŝtelis sola aŭ ĉu vi havis kompanianon?

Akuzito : — Sola, sinjoro juĝisto; ĉu oni povas havi en nunaj tempoj honestan kompanianon?

Frazo de poeto...

Kiel belega sunsubiro, dum la tuta nokto oni povus ĉi tie sidi kaj admiri...

Ŝi divenas.

— Malbonan komunikon mi alportas, sinjorino — diras leterportisto transdonante leteron nigre borderitan.

— Ah, ekkrias senteme la virino, certe mortis mia frato, mi rekonas lian skribon!

— Malriĉul venas al Hebreof kaj almozpetas.

— Neeble. Mi jam ne povas ion doni, mi subtenas mian fraton.

— Tamen, respondas Malriĉul, via frato plendas, ke vi nenion donas al li.

— Nu, rediras Hebreof, se mi nenion donas al mia frato, kiel mi povas ion doni al vi!

Rememoroj.

Ŝi: — En ĉi tiu parko ni interkonatiĝis. Tio okazis antaŭ dudek jaroj. Kaj nun oni sur ĉi tiu loko konstruos domon....

Li: — Jes, dudek jarojn tro malfrue.

Vera ripozo.

Kuracisto (al oficeja fakestro):

Vi nepre bezonas pli da trankvilo. Estus bone, se vi almenaŭ du horojn pli longe restadus en oficejo kaj ne hejme...

Malnova historio.

Sendante sian filon al kongreso la sveda kanceliero Oxenstiern eldiris jenajn famajn vortojn:

— Vi vidos, mia filo, kiaj idiotoj regas la mondon!

Do jam en la 17-a jarcento oni tion rimarkis.

Ĝemeloj.

Ĝentile maljuna sinjoro demandas du malgrandajn infanojn:

— Vi certe estas ĝemeloj.

— Ne — respondas la etuloj.

— Kiom aĝa vi estas?

— Sep.

— Kaj vi?

— Ankaŭ sep.

— Do vi estas tamen ĝemeloj.

— Ne — estas la respondo — ni estas la resto el la triuloj.

Inteligenta antaŭ vidonto.

— Kial vi veturas ĉiam sola en via aŭtomobilo? Kial vi ne kunprenas amikojn al via ekskurso?

— Ha, ha, ha! Kiu tiam rekonus, al kiu apartenas la aŭtomobilo?

Ŝi pravas.

Edzo (al sia malsana edzino): — Mia kara, kial vi ne volas voki la maljunan kuraciston Delegitoviĉ? Juna kuracisto ne havas tiom da sperto.

Edzino: — Mia kara, se ni ne vokos la junan, do li neniam havos sperton.

Inter geedzoj.

- Jaĉjo, ĉu vi ĉiam restos al mi fidela?
- Kompreneble, karulino, se nur la tempo al mi tion permesos.

Antaŭ la akvofalo de Niagara.

- Usonano: — Kia agrabla bruo!
- Franco: — Kia malŝparo de akvo!
- Brito: — Kia admirinda duŝo!
- Germano: — Foriras por fari la prikalkulon de la utiligeblaj ĉevalfortoj.

Teorio pri frakcioj.

Antaŭ junaj lernantoj instruisto klarigas la teorion pri frakcioj kaj donas jenan problemon al unu infano:

— Unu patrino havas ses infanojn kaj naŭ pomojn. Ŝi volas doni al ĉiu infano egalan parton da pomoj. Kion ŝi devas fari por ne elvoki la ĵaluzon?

La infano respondas:

— Ŝi devas fari kompoton...

Marta, kvarjara infano, malvarmumis kaj nur pene respiras.

— Venu rapide, panjo, ŝi krias, jen mia nazo sufokiĝas!

La ruza Liszt.

La komenca kariero de Liszt ne estis facila. Tiutempe li, akompanata de tenoro Rubini, donis serion da koncertoj en la grandaj skandinavaj urboj. Unu vesperon en unu el

la skandinavaj ĉefurboj la artistoj devis koncerti antaŭ preskaŭ malplena salono. Furioza, Rubini rifuzis kanti. Sed Liszt ekkriis al sia amiko: „Vi devas kanti kiel eble plej bone; ne forgesu, ke tiu trideko da ĉeestantoj estas la muzika elito en tiu lando de sovaĝuloj”.

Rubini do kantis kaj Liszt ludis, kiel li sciis ludi. Meze de koncerto Liszt leviĝis subite kaj diris: „Gesinjoroj, mi admiras vian paciencon kaj kapablon elteni tiom da muziko. Mi proponas nun al vi alian distraĵon, kiu eĉ plaĉos al vi pli: Honorigu min akceptante inviton al noktomanĝo”.

Post kelkaj hezitoj la bonaj ĉeestantoj ne rifuzis akcepti tiun agrablan inviton. Tiu vespero kostis multe al Liszt; sed la morgaŭan vesperon la salono estis plenplena. Cetere ĉi tiu vespero estis elreviĝo por la ĉeestantaj muzikamantoj: ĉi tiun vesperon Liszt invitis neniun al noktomanĝo.

Esperantista senlaborulo.

— Ĉu vi serĉas laboron? Kion vi povas fari?

— Mia bona sinjorino, se vi donos al mi bonan manĝon, ekzempleron de „Nia Gazeto” kaj bonan apogseĝon, mi gardos atente la fajron de via kameno.

Kamparana rezonado.

Unu sinjoro volas lupreni ĉevalon ĉe kamparano:

— Kiom da antaŭpago vi deziras?

— Ni ne volas antaŭpagon, sed la tuton.

— Kiel? Ĉu vi do timas, ke mi revenos sen ĉevalo?

— Oh, ne, sed povus okazi, ke la ĉevalo revenus sen vi!

Laŭ teorio de Einstein.

— Ĉu estas malproksime al stacidomo?

— Tute ne — unu minuton de la ĉefplaco...

— Kaj kiom da tempo oni bezonas por aliri la ĉefplacon?

— Ĉirkaŭ dudek minutojn.

Profesio.

- Ĉu via patro ne estas neŭrasteniulo?
- Tute ne, li estas seruristo!

Sendependeco

- Nu, kion vi faras, Sentaŭgof, post viaj sukcesintaj ekzamenoj?
- Ha, mi vivas verdire el skribado.
- Kio, vi skribas?
- Jes, en esperantaj gazetoj.
- Kaj el kio vi vivas?
- Ankaŭ el skribado; mi petskribas leterojn al mia patro.

La geedziĝa filozofio.

La filo baldaŭ edziĝos kaj tial lia patro donas al li konsilojn por bona geedziĝa kunvivo.

— Memoru, mia knabeto — plej bone faru kiel mi faris kun via patrino. Ni decidis, ke en ĉiuj ordinaraĵoj la decido apartenos al ŝi; nur en gravaj aferoj la decido apartenos al mi.

- Kaj ĉu la aranĝo estis kontentiga?
- Kompreneble, mia filo. Se mi bone nun rememoras, en nia geedziĝa kunvivo estis eĉ ne unu grava okazaĵo.

En vagonara fako.

- Pardonu al mi, sinjoro, ĉu mi povas peti vian poŝtukon?
- ?!?!?!?!?!?
- Mi povas certigi vin, ke ne por viŝi mian nazon, sed nur por senpolvigi miajn ŝuojn.

Kontenta.

La muzikarto de mia filino alportas al ni feliĉon.

- Kiamaniere?
- Mi povis lupreni la du najbarajn apartamentojn.

— Vi plendis, panjo, ke la alumetoj, kiujn mi aĉetis hieraŭ, estis malbonaj kaj vi diris, ke mi aĉetu hodiaŭ bonajn. Jen, panjo, survoje mi provis ilin kaj mi konstatis, ke eĉ ne unu estis malbona....

Kial?

— Paĉjo — demandas juna okjara Rabinoviĉ. — Kial la arboj tiom rapide kreskas?

— Vi estas malsaĝa, mia filo! diras la maljuna Rabinoviĉ. Ĉu ili havas ion alian por fari? Pro tio ili kreskas.

Surstrate.

— Kiel vi aspektas, kara amiko; Via vizaĝo bandaĝita! kvazaŭ post ia batalo! Ĉu vi volas, ke mi konduku vin hejmen?

— Mi dankas al vi. Ĝuste el tie mi eliris...

Ĉe la kuracisto.

Paciento: — Mi volus ĝisvivi 80 jarojn; kion mi devas fari por tio?

Kuracisto: — Ĉu vi fumas?

P.: — Neniam mi fumis.

K.: — Ĉu vi trinkas?

P.: — Mi estas kontraŭalkoholulo.

K.: — Ĉu virinoj vin interesas?

P.: — Tute ne.

K.: — Do, Kara sinjoro, diru al mi, pro kio vi volas atingi aĝon de okdek jaroj?

Kipman fartas malbone en ĉi tiu kriza tempo. Li veturas en grandan industrian urbon por tamen fari ian bonan negocon.

Li eniras grandan ŝtofmagazenon, kie oni akceptas la maloŝtan klienton kun trea simpatio. Kipman volas aĉeti ŝtofon je tridek mil spesmiloj. Li petas krediton. Li pagos per tri monataj kambioj. La posedanto de magazeno, s-ro Kantoroviĉ, respondas:

— Bone, sed mi devas informiĝi pri vi. Bonvolu reveni postmorgaŭ.

Kipman eniras magazenon je la fiksita tago.

Kantoroviĉ tuj ekkrias:

— Oh, fripono! Al neniu vi iam pagis, vi bankrotis dufoje, sidis en malliberejo, viajn kambiojn oni protestas kaj vi kuraĝas demandi krediton? Krediton je tri monatoj?

Al tio Kipman respondas trankvile:

— Kial vi koleras? Estu je unu monato...

Lerneja stilo.

Jaĉjo malsanis kaj dum du semajnoj li ne estis en lernejo. Kiam resaniĝinte li venas en la klason, la instruisto de historio diras:

— Vi devos atingi viajn kolegojn. De kiam vi malsanis?

— De la krucmilitoj.

— Jes, kara Jakobo, vi nepre devas edziĝi kun Rebeka. Ŝi estas bela kaj havas belan doton.

— Bone, bone, kiom ŝi havas?

— Kvindek mil spesmilojn, se la patro ne bankrotos.

— Kion tio signifas „se la patro ne bankrotos“?

— Ah, malsaĝuleto! Se la patro bankrotos, tiam vi ricevos cent mil!

La dresado de leono.

Edzino de dresisto (al sia edzo): — Kiamaniere vi sukcesis dresi nian leonon?

La dresisto (fiere): Tutsimple, mi timigis lin, ke mi vin alvokos.

Ĉe juna kuracisto.

— Ĉu vi havas atendejon, kara doktoro?

— Eĉ du, kara amiko, respondas doktoro. Unu, en kiu la pacientoj min atendas kaj la duan en kiu mi atendas la pacientojn.

— Mia filo, citu al mi travideblan objekton!

— Seruro, kara paĉjo.

Inter infanoj.

— Via patro estas ŝuisto kaj vi ne havas ŝuojn.

— Via estas dentisto kaj via malgranda frato havas nur tri dentojn.

Inventisto prezentas sian inventon al direktoro de teatro:

— Kun mia sistemo vi povos malplenigi vian salonon en kvin minutoj.

— Ĉu vi ne havas alian inventan sistemon, kiu ebligus ĝian plenigon?

— Kiel? vi edzinigis vian filinon kun via kasisto? Vi ja ne havis fidon en li!

— Ĝuste pro tio! Se iun tagon li forkuros kun mia kaso, almenaŭ mia filino profitu el ĝi!

— Kial la fiŝoj estas mutaj?

Lernanto: — Ĉar ili tenas la kapon en la akvo.

— Kompreneble, vi edziĝis kun mi, ĉar mi havis monon.

— Ne, tute ne, nur tial, ĉar mi ne havis monon.

Delegito de UEA renkontas hazarde ne multe konatan membron en la strato de sia urbo kaj invitas lin per jenaj vortoj :

- Mi estas kontenta vin renkonti, ni iru por preni ion.
- Al kiu? demandas la alparolito.

Inter najbaroj.

— Pruntedonu al mi vian azenon, kara Johaĉjo, mi volas iri al la foiro por fari propagandon por esperanto.

— Kun plezuro mi estus plenuminta vian peton, sed bedaŭrinde la azeno estas en la kampo.

Oni aŭdas la azenblekon en la stalo.

— Strange, Johaĉjo, vi diras, ke via azeno estas en la kampo kaj ĝi blekas en la stalo!

— Pli strange, respondas ofendite Jozefo, ke vi fidas pli al la azeno ol al mi!

Antaŭ la tombo.

Antaŭ tombo Pantoflul plorĝemas: Ah, mia Dio, — vi ne devis morti! Iu alproksimiĝas por lin konsoli:

— Ĉu mortis via patro aŭ patrino, ke vi tiom plorĝemas?

— Tute ne, respondas Pantoflul, mi priploras nur la morton de la unua edzo de mia edzino!



LA ESPERANTO INSTITUTO

POŝTFAKO 81, VENLO POVAS TUJ LIVERI AL VI:

Prezo en holandaj guldenoj prezo: broŝ. bind.

LIBROSERVO

Ivans: La viro el Francujo trad. W. Versteeg Graftdijk	2.25
H. Sienkiewicz: Quo Vadis? trad. Lidja Zamenhof — 2 volumoj	4.50
H. Rider Haggard. Ŝi trad. G. J. Degenkamp	2.25
Fred. van Eeden: La malgranda Johano trad. H. J. Bulthuis, L.K.	0.85
A. S. Puŝkin: La kapitanfilino trad. M. Sidlowskaja	0.85
W. E. Collinson: La homa lingvo	0.65
Lucius Apulejus: Amoro kaj Psiĥe trad. E. Pfeffer	0.25
F. Herczeg: Hungaraj rakontoj trad. Panajott	0.25
E. Zahn: La patrino ~ trad. J. Smid	0.25
J. J. Porchat: Sub la neĝo ~ trad. J. Borel	0.50
Heinrich Heine: Atta Troll, Somernokta Sonĝo ~ trad. Zanoni	0.65
Fr. Pillath: Germanaj kantoj esperantigitaj	0.40
P. Firu kaj S. Pragano: Rumana Bonhumoro	0.75 1.25

Aldonu 10 % pro la sendkostoj ĉe mendo
de la supraj libroj!

La sekvantajn librojn ni liveras enlande aŭfrankite!

Eksterlandanoj devas aldoni 10 %!

A. G. J. van Straaten: Esperanto Woor- denboek	4.90
H. Ibsen: Imperiestro kaj Galileano trad. H. J. Bulthuis	3.50 3.90

Hendrik Conscience : La leono de Flandrujo		
trad. H. J. Bulthuis	3.25	3.75
H. J. Bulthuis : La aventuroj de Robinsono		
Kruso, kompilita laŭ Campe		1.95
Ch. Bronte : Jane Eyre - trad. H. J. Bulthuis	5.25	5.90
H. J. Bulthuis : La juna Robinsono (laŭ Campe)	0.60	
J. Baghy : La teatra Korbo	0.75	
Homeros Oduseias - trad. W. J. A. Manders	3.90	4.65

GAZETSERVO:

La abonejo nederlanda por **NIA GAZETO** (monata revuo ; ĉefredaktoro S. Grenkamp-Kornfeld) estas nur ĉe ni. Abonprezo jare fl. 1.25. Petu specimenon.

EKSPOZICIO:

Unuiĝoj enlandaj kaj eksterlandaj petu informojn pri luo de nia bonega ekspozicia kesto (20 K.G. da materialo). Postulu recenzojn. Por Nederlando estas la prezo aŭ frankite nur fl. 3.50.

PAGMANIEROJ:

En landoj, kie ni havas poŝtan konton oni pagu prefere per poŝtĉeko, sed ĉiam je la nomo de la administranto J. M. van Meegeren.

Nederlando : Venlo 230505

Belujo : Bruxelles 350389

Danujo : Kobenhavn 24929

Svedujo : Stockholm 74231

Angloj kaj Usonanoj povas pagi en London kaj New York (belga banko por la eksterlando). Alilandanoj per poŝtmandato, bankĉeko, respondkuponoj aŭ papermono.



Esperantistoj !

Vi ofte esprimis la deziron havi sendependan organon liberan por ĉiuj, atentantan ĉiujn aktualajn demandojn, samtempe instruan kaj distran, unuvorte vivantan.

TIA ORGANO ESTAS:

NIA GAZETO

la plej malkara el ĉiuj esperantaj gazetoj
monata, grandformata, okpaĝa,
ilustrita, internacia revuo

Direktoro : GEORGES AVRIL

Ĉefredaktoro : GRENKAMP-KORNFELD, LK

Cefkunlaborantoj : Prof. W. E. COLLINSON (Britujo) — C. AYMANNIER ; d-ro BRIQUET ; d-ro CORRET ; prof. COTTON, membro de l'Instituto ; prof. DEJEAN ; ERA ; L. LEONTIN ; prof. VANVERTS (Francujo). — JAUME GRAU CASAS (Hispanujo). — JULIO BAGHY (Hungarujo). — CAN-SO-LIN (Ĥinujo). — Prof. Bruno MIGLIORINI ; d-ro Erlio MIGLIORINI (Italujo). — I. ROTKVIC (Jugoslavio). — F-ino Lidja ZAMENHOF ; prof. d-ro O. BUJWID ; I. LEJZEROWICZ ; F. A. PRENGEL (Polujo). — Prof. P. BOVET (Svisujo)

PREZO DE ABONO : Francujo 2.— landoj aliĝintaj al la konvencio de Stockholm 2.40, aliaj landoj 3.— Frankoj svisaj, nur antaŭpage. Pagebla per poŝtmandato, monbiletoj, respondkuponoj, respondkuponoj de U E A.

Poŝtĉeko : Eclairer, Marseille 262.74

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO : ĉe l'Eclairer, 29, avenue de la Victoire, NICE (Francujo)

Mendu tuj specimenan numeron kontraŭ respondkuponon de poŝto aŭ U E A.

Internacia deponejo: Libro servo de U E A
— Universala Esperanto-Asocio, Genève —

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0002440